*************************************************************************************

AGEI-CIRKULERO septembro-decembro 2008 (n-ro 17)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

*************************************************************************************


1. AGEI-jubileo: 40-jaroj
2. Lerneja instruado kun alvoko
3. GEK: AGEI-kunveno
4. Klerigado
5. Sekva studsesio
6. Lerneja instruado
7. Popolaltlernejo
8. SUB-18
9. Lernmaterialoj
10. TOREDO-4
11. Juna Amiko
12. ILEI-novaĵoj
13. Didacta-2008
14. Urĝa alvoko


AGEI-JUBILEO

1. AGEI-jubileo: en 2008 AGEI, nia landa sekcio festis la 40-jariĝon de sia agado post la novfondo (München, 02.06.1968). En malnovaj dokumentoj en la arkivo kaj biblioteko de Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro mi trovis tiun daton kaj ŝatus tutkore gratuli al ĉiuj gekolegoj, kiuj antaŭ 40 jaroj renovigis la statuton kaj restis ĝis hodiaŭ aktivan en „Verband Deutscher Esperanto-Lehrer“ / Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj.
AGEI-estraro sendis gratulleteron al niaj fidelaj gekolegoj pro la plurjardeka aktiva membreco.

**LERNEJA INSTRUADO 2008/2009**

Atingis nin kelkaj bonaj novaĵoj: regula Esperanto-instruado okazas en
Ahrensburg (Helmut Lasarcyk)
Dresden (Benoit Philippe)
Emden (Sebastian Kirf)
Hameln (Heinz Sprick) .
Herzberg (Otto Kern, Zsofia Korody)
Münster (Dr. Rudolf Fischer)
Winterberg(Christof Krick)

Manke de instruisto interesan solvon trovis gimnazianoj en Hameln: post sukcesa projektsemajno ili eklernis Esperanton kun du instruistinoj. La grupeton porokaze fake helpas Heinz Sprick.

Ankaŭ en Herzberg kunlernas instruistoj en du lernejaj grupoj, tiel alproprigante ne nur la lingvon sed ankaŭ la metodon de instruado de Esperanto.

Grandan sukceson atingis Nicolai bazlernejo kun la faka gvidado kaj subteno de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg: la komune ellaborita 2-jara Comenius-projekto kun la bazlernejo en Bar Hill (Cambridge, Britio) kaj Miskolc (Hungario) gajnis subvencion de EU.

Dr. Rudolf Fischer: Jhus ekde oktobro komencighis mia nova kurso en la universitato de Muenster. Kontraue al la antauaj jaroj mi ne ofertis blokon dum unu semajno, sed instruas komencantojn unufoje semajne dum 2 instruhoroj. 12 studentoj alighis (estis 15 lokoj).

La unuan fojon partoprenas ankau studentoj de la nova bakalaura studo, versio "2-faka bakalaureco". Nur en tiu estas parto "gheneralaj studoj", en kies subparto "lingvokompetenteco" estas multaj kursoj por diversaj lingvoj, inter ili nun ankau Esperanto.

Resume do, nur en tre malgranda subgrupo de bakalauraj studoj eblas lerni Esperanton. Aliflanke, la studentoj nun ricevas poentojn kiel por aliaj lingvokursoj kaj notojn de mi. Fine ili faras skriban teston, kiu decidos pri la sukceso (kaj nur tiam ili ricevos 2 poentojn). 6 el 12 jam petis, ankau submeti sin al plia busha ekzameno de Germana Esperanto-Instituto fine de la semestro.

Pro la bona komenco la chefo de la Instituto pri Gheneral Lingviko jam diris al mi, ke mi rajtos daurigi tiel, ankau post mia pensiuligho fine de februaro de 2009. Do, dum la somera semestro de 2009 okazos dauriga kurso.

Estas shanco, altigi la poentojn al 3.
Ju pli da poentoj, des pli da studentoj. (Hm, chu nova proverbo?) :-)

**ALVOKO** al ĉiuj, kiuj gvidas lernejan, universitatan kurson: bv. enskribiĝi al la listo de E-lernejoj ĉe http://edukado.net. Ĝis januaro estos kolektataj la datenoj, kie kaj kiom intense okazas E-instruado en la opaj landoj. Tiu statistiko servos ankaŭ ekstermovadan informadon.
Uzu ankaŭ la rektan ligilon:
http://edukado.net/?search=1&elementId=154&lando=DE
Dankon pro via helpemo.

Por la nova lernojaro kaj por la tuta kalendara jaro 2009 mi deziras al ĉiuj gekolegoj sukcesojn, forton, energion, iniciatemon kaj kompreneble bonajn sukcesojn!

**FAKPRELEGOJ/INSTRUKAPABLIGO**

Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg (ICH) prizorgas trejnadon, klerigadon de instruantoj kaj ofertas Studsesiojn dum la tuta jaro. La instruprogramo enhavas gramatikon, lingvistikon, interlingvistikon, literaturon, movadhistorion, kaj aliajn fakojn, ekz. varbadon, informadon, kaj kompreneble metodikon de lingvoinstruado. La sesioj okazas en modul-sistemo ĉ. 4-5 foje jare, bv. rigardi la programkalendaron kaj kurs-ofertojn sur la ICH-hejmpaĝo.

**PLUKLERIGADO en HERZBERG:**
Ankaŭ en 2008 bone sukcesis la Tutlandaj Oktobraj Pedagogiaj Tagoj: TORPEDo-4.
Ĝi allogis ne nur germanoj, sed ankaŭ perfektiĝemuloj el Pollando, Italio, Nederlando, Koreio.
Kaj la Studsesioj kaj Torpedo servas ne nur tiujn, kiuj estas aŭ ŝatus fariĝi kursestroj aŭ instruistoj: la invititaj fakuloj, la altnivelaj fakprelegoj kontentigas ĉiujn partoprenantojn.

Ni dankas al tiuj, kiuj kompetente helpis kaj helpas atingi klerigcelojn: Dr. Detlev Banke, Dr. Rudolf Fischer, Sabine Trenner, Stefan MacGill, Zlatko Tisljar, Peter Zilvar, Zsofia Korody

NOVAĴOJ pri instruado:

**Interlingvistikaj Studoj en Poznan**
Interlingvistika Simpozio okaze de la 10-jariĝo de la Interlingvistikaj Studoj de UAM

Post la ĉi-jara interlingvistika sesio en UAM kolektiĝis pli ol 80 homoj en la moderna konferencejo de UAM por la du-taga simpozio (18-19.09) „Lingvistikaj kaj kulturaj aspektoj de interlingvistiko”. Alvenis grandparto de la kursgvidantoj, malnovaj kaj novaj gestudentoj de la Studoj , krome grandnombre specialistoj kaj interesiĝantoj pri interlingvistiko el 22 landoj (de Germanio tra Rusio ĝis Brazilo kaj Irano) por kune festi la 10-jariĝon de la Studoj.

Lasta sekcio pri metodiko same vigligis la partoprenantojn per la prezento de Lingvolanĉilo far A. Tellier, la Komuna Eŭropa Referenckadro far K. Kováts. La propedeŭtikan valoron de e-o analizis M. Nitkowska kaj la tipajn erarojn de francoj en e-o A. Jausions.

Dum la fermo okazis disdono de atestiloj por la nunaj diplomiĝintoj de la Interlingvistikaj Studoj kaj por tiuj, kiuj finis la unujaran instruistan kurson realigatan en UAM kunlabore kun ILEI.
Samtempe ekzameniĝis kaj ricevis instruistan diplomon de ILEI (kadre de la unujara komuna kurso de UAM kaj ILEI, organizita la unuan fojon en la studjaro 2007/08) 3 aliaj partoprenantoj: Jurate Bartaskiene (Utiligo de poemetoj, rimaĵoj kaj kantoj en la lingvoinstruado, Litovio); Witold Czerwinski (Pedagogia vortareto Esperanta-pola, Pollando) kaj Edit Slezákné Tar (Instruado de akuzativo je diversaj niveloj, Hungario). La laboraĵoj pri metodiko legeblas en Edukado.net.
Malgranda, sed entuziasma nova grupo komencis siajn studojn inter la 13-17a de septembro. Alvenis po du partoprenantoj el Brazilo, Irano, Kroatio kaj Usono, po unu el Francio, Grekio, Koreio kaj Ukrainio. Du afrikanoj, bedaŭrinde, ne ricevis polan vizon - ili nur virtuale povas sekvi la unuan semestron.

Pri la Esperanto-laborgrupo en la Schiller-gimnazio mi povas diri al vi, ke aliĝis nun 9 lernantoj kaj 2 instruistinoj, kiuj mem lernas Esperanton ĝi finfine nun okazas ĉiun lundon posttagmeze (mi bedaŭrinde je tiu tempo devas labori), sed mi instruas ilin 1-ĝis 2-foje monate sabate antaŭtagmeze. Pasintan sabaton mi kunvenis kun ili la unuan fojon kaj mi disdonis la lernolibrojn de Stano Marĉek Esperanto - direkt. Ili volonte volas uzi tiun libron kaj ankaŭ jam komencis per la Kurso de Esperanto (el Brazilo) el la reto. Mi jam korektis kelkajn ekzercojn, kiujn kelkaj tre diligentaj lernantoj sendis al mi. Mi esperas, ke kun tiu kombino ni sukcesos. Ĝis nun ĉiuj ĝojas, ke okazas vere nun la E-laborgrupo. Mi ankaŭ faros iun kontrakton kun la gimnazio, sed la respondeca instruistino ĝis nun ne altelefonis min.

Korajn salutojn el Hessisch Oldendorf,

A1-C2: la unua EU-konforma E-ekzamensistemo Esperanto estas ene de la hungara ŝtata lingvo-ekzamensistemo kaj tiel ĝi estas la unua, kiu konformas al la novaj Eŭrop-Uniaj normoj. Ekde septembro 2006 lingvokono de Esperanto estas same mezurebla kaj estas egalrajte agnoskata, kiel la aliaj fremdaj lingvoj.

La baz-, mez- kaj supergradaj ekzamenoj estas alĝustigitaj al la 6 niveloj (A1-C2) laŭ la skalo de la Konsilio de Eŭropo - la skemon oni povas vidi en la oficialaj retpaĝoj de la ekzamencentro en Budapest: http://www.itk.hu/origo/alt_info/

> Vi ja scias, ke c'efa c'iujara kunveno de esperantistoj, sendube,
> estas UK.
>
> Tamen lingvo disvastig'as nur instruante g'in. Kaj pri tio en
> Esperantujo repondecas instruistoj, kiujn ligas Internacia Ligo de
> Esperantistaj Instruistoj (ILEI).
>
> Plej grava faka organizo esperantista, partnero de UEA pri edukado -
> nome ILEI - kunvenos en Krakovo (Pollando) la 17-25/08/2009, tuj

> antau UK.
> Vi havas unikan s'ancon esperantumi kun lingvoinstruistoj en reg'a
> urbo survoje al Bjalistoko.
>
> Bonvolu vidi Varbilon en http://www.ilei.info/agado/index.php?lingvo=eo
> .

La Esperanto-AG nun vere komencis kaj jene okazas:
>> 9 gelernantoj el la 8-aj gis 10-aj klasoj kaj 2 instruistinoj
>> kunvenas ciun lundon posttagmeze dum 1,5 horoj kaj mem lernas
>> Esperanton. Ili uzas la lernolibron de Stano Marcek „Esperanto –
>> direkt“ kaj ankau povas uzi la retan kurson „Kurso de Esperanto“ (el
>> Brazilo). Mi proponis, korekti la ekzercojn de la reta kurso hejme.
>> Kaj unu tre diligenta lernantino jam sendis la ekzercojn de la kvara
>> leciono al mi.
>> Mi instruas la lernantojn unufoje (eble iam dufoje) monate sabate
>> antautagmeze dum 2,5 horoj, dum kiuj mi cefe provas paroligi la
>> lernantojn. Kaj ankau mi volas rakonti al ili ion pri la
>> Esperanto-movado, respondi al demandoj, ktp.

La solvo instrui E-ien tiu formo povus esti modelo ĉe aliaj lernejoj, lokoj. La manko de E-instruistoj instigu nin ĉiujn al plua agado por trejnado kaj pluklerigado.

-Juna Amiko estas interesa revuo por komencantoj kaj lernejanoj.
Aperas trifoje jare. Formato A5, 52 paĝoj.
Tarifo por 2009: Prezo 1200 Ft (900 forintoj ekde 3 ekzempleroj)
Se vi (re)abonas antaŭ la fino de 2008 validos ankoraŭ la
ĝisnunaj prezoj:
1000 forintoj (750 forintoj ekde 3 ekzempleroj)

Alklaku sube kaj spektu la filmeton MAZI EN GONDOLANDO:
http://uk.youtube. com/watch?
v=OBfPSe0rkAM<http://uk.youtube.com/watch?v=OBfPSe0rkAM>
Informis: Aloísio Sartorato
Rio, Brazilo

Avo Frosto respondas en Esperanto!

Kristnasko-2008 baldaŭ alvenas kaj plurcentmiloj da infanoj en la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Jam delonge, Avo Frosto kutimas respondi en la franca, la angla kaj en dudeko da aliaj lingvoj sed ekde 2002, la norda saĝulo ankau lernis Esperanton.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, junaj kaj junkoraj, malkovri tiun tradicion, skribante al Avo Frosto.

Simple sendu manskribitan leteron al la adreso:

Avo Frosto,
Norda Poluso,

Kanado, Canada
HOH OHO

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi.

Ne forgesu *klare skribi vian nomon kaj adreson* por certigi ricevon de respondo. Krome, indiku klare, ke la letero estas en Esperanto ĉar la helpantaj koboldoj ne ĉiam rekonas pri kiu lingvo temas.

P.S. La poŝta kodo estas vera kaj grava parto de la adreso. Ĝi estas rezervita al Avo Frosto.

Pretas respondi demandojn :
Normando Fleury
koboldo por la Kanada Poŝta servo
Esperanto-Societo Kebekia
6358-A, rue de Bordeaŭ, Montrealo, Kebekio, Kanado, H2G 2R8

ILEI-konferenco
ric'a ekskursa, distra, kultura kaj faka programoj.
Kial Krakovo estas tiom alloga? - vidu la Alvokon - 1 en
http://www.ilei.info/konferenco/Alvoko_Krakovo_1.doc
Kaj g'is la revido en la reg'a urbo!

From: Luiz A. de O. Coelho <drakoluiz@yahoo.com.br>
Date: 2008/12/12
Subject: propono de internacia lerneja klaskorespondado
To: bea@interpres.org

Estimataj,
Saluton. Mi venas al vi kun helpopeto.
Ŝtato instruas fremdajn lingvojn por plivastigi la horizontojn de sia infanaro. Nu preskau vane, ni scias. Ni, anoj de Tri-Rivera Esperanto-Klubo, urbo proksima de Rio, en Brazilo, volas iel helpi. Kiel? Per perado de internacia lerneja klaskorespondado.
La lernantoj devas esti en klaso post la 4-a lernojaro. La klaso kolektive sendu leteron al samlernojara klaso en alia lando. Ne temas pri E-klasoj, do ili verkos nacilingve, tiel ke inter unuopaj linioj estu spaco, eĉ sufiĉe vasta por la tradukoj. La leteron ni, e-istoj, traduku al la internacia lingvo kaj sendu al la eksterlanda klaso. Tie, alia samideano, partnero traduku al la nacia lingvo kaj transdonu al vialanda klaso por ke ĝi legu kaj respondu. Tiam ĉio denove rekomencu. Do la leteroj fine montriĝos - certe kurioze kaj agrable - trilingvaj...
La korespondado devus okazi ne interrete ĉar ĉi tie maloftas lernejoj kun tia eblo. Cetere per ordinara poŝto facilas sendi aldonaĵojn: bildojn, fotojn, desegnaĵojn, mapetojn ktp lau fantazio kaj bontrovo de la gelernantoj kaj de ties instruistoj.
Fine de la lernojaro, okaze de sukceso, fariĝus eĉ ekspozicio, kio belege efikus al nia Afero: meto de E-o en praktikon.
Krome ni celas per tio ankau, ke la gelernantoj mem ekdeziru estonte 'sendependiĝi' de la tradukistoj, do mem lerni la lingvon.
Kun varmaj bondeziroj, salutas vin kore

Luiz Alberto de Oliveira Coelho
UEA-delegito por Orienta Brazilo
Rua Moreira César, 220
Paraíba do Sul-RJ
25850-000
Tel.: 24-2263-1421
BR-25850-000

E-o en lernejoj alvoko registriĝi
http://edukado.net/?search=1&elementId=154&lando=DE

Da die Räumlichkeiten auch für AGEI, Lehrer, Studierende, Lernende genutzt werden können, bitten wir um einen Zuschuß von AGEI in Höhe von 1/3 (einem Drittel) des geschätzten Mindestbetrages.